

Numero: 280.  
Septembro: 2015.

23-a jarkolekto

# Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefono: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

## Ni hungaroj forgesas nian gepatran lingvon

Onidire la hungara estas pralingvo. Ĝi jam ekzistis antaŭ multaj jarmiloj. Eble pli frue ol aliaj grandaj lingvoj en la mondo.

Malgraŭ tio, tamen ankoraŭ nun ni povas legi tre malnovajn hungarlingvajn tekstojn sen ia ajn helpilo, tradukilo.

La hungara lingvo estas speciala. Vere ĝi similas al neniu lingvo. Mi scias, kelkaj sciencistoj, lingvistoj asertas, niaj lingvaj parencoj estas la finnoj, estoj kaj aliaj malgrandaj popoloj vivantaj kaj vivintaj en Rusio.

Sed tiu ĉi tezo jam falis kaj la modernaj lingvistikaj kaj genetikaj esploroj pruvis, la hungaroj ne parenkas kun ili. Estas kiuj argumentas je la simileco de multaj vortoj, eĉ esprimoj:

*Jég alatt télen eleven halak úszkálnak.  
Jään alla talvella elävät kalat uiskentelevat.  
Sub glacio vintre vivaj fiŝoj naĝadas*

*Miniäni antoi voita.  
Menyem adott vajjat.  
Mia bofilino donis buteron*

Certe ĉiu vidas la similecon. Sed tio ĉi nenium trompu. Eblus ekzameni ankaŭ aliajn lingvojn kaj oni trovus similajn vortojn en ili.

La moderna scienco forte pruvis, krom la reciproka amikeco inter finnoj kaj hungaroj ne ekzistas lingvaj komunaj radikoj.

Ni devas serĉi niajn lingvaj kaj genetikajn parencojn aliloke.

Eble mia agnosko kaŭzis ĥaoson en la cerbo de multaj legantoj.

Ne ĝi estis mia celo. Sed mi deziras malkovri la veron por la tutmonda esperantistaro, ke ili vidu la lokon de la hungara lingvo. Pri kio ankoraŭ nun multaj homoj opinias mistere, kaj efektive oni ne konas la veron.

La titolo de mia studaĵo estas: „Ni hungaroj forgesas nian gepatran lingvon”

Laŭ mi nuntempe ĝi estas grava problemo. Senĉese la hungara lingvo estas atakata pere de fremdaj vortoj kaj esprimoj. Ĉefe la anglodevenaj lingvoj minacas ĝin.

Ne forpasas tagoj sen ekapero de iu fremda vorto kaj esprimo.

Laŭ mia opinio la situacio estas la plej danĝera sur la tereno de komputiko. Sed tiu ĉi fenomeno estas sperteblo ĉie en la vivo.

Se mortintoj, kiuj estis entombigitaj antaŭ jardekoj, reviviĝus, ili ne komprenus la nunan homon kaj ili postulis interpretiston.

-daŭrigota-

-Redaktanto-

## Okazis ĉe la hungara landlimo

La ĵurnaloj estas plena de la hungarlandaj okazintaĵoj tra la tuta mondo. Frontpaĝe oni povas legi diversajn artikolojn, kiuj pozitive aŭ negative informas pri la krizo.

Antaŭ nelonge mi vidis televidoprogramon, en kiu iu ĵurnalisto demandis ion de la ano de la registaro. Li argumentis, ke la hungara ŝtato malbone zorgas pri la migrantoj. La juna ĵurnalisto deziris apogi sian rimarkon per persona travivaĵo. Li estis ĉe la hungara – serba landlimo kaj li parolis kun iu migranto kaj tiam li akiris la informojn. La intervjuita migranto rakontis al la hungara ĵurnalisto pri la konfliktoj kun la oficistoj en Hungario. Oni donis al li hungarlingvan dokumenton, kial estis rifuzita lia azilopeto.

La ĵurnalisto pruvis, ke la migranto fine ricevis nur hungarlingvan dokumenton, kion li ne komprenis. Jen la hungara registaro, kiu ne atentis pri la lingvaj malfacilaĵoj kaj ne helpas al la malfeliĉaj migrantoj.

Rapide venis la respondo de la reprezentanto kaj li detale klarigis dum la oficiala aferoaranĝo ĉiufoje ĉeestas interpretisto, kiu majstre tradukas la oficialajn parolojn, tekstojn kaj ĉion por la migrantoj. Fine oni demandas, ĉu la traktado estis komprenita aŭ ne. Krome, ĉu li aŭ ŝi deziras la tradukitan oficialan tekston al sia gepatra lingvo?

Komprenoble ankaŭ tie ĉi povas okazi miskomprenoj. Ĉefe tiam, se la migrantoj uzas iun tribo- aŭ lokan lingvon.

Reveninte al nia ĵurnalisto, kiu senĉese pruvis sian veron kaj deziris nigriĝi la hungaran registaron.

Laŭ mi la situacio jam estis tre ĝena. La aŭskultantoj kredis, eble la ĵurnalisto pravas kaj vere la hungaraj oficistoj ne atentis pri la lingvaj malfacilaĵoj.

Kiam neniu atendis demandon de la reprezentanto, li demandis:

-Sinjoro, en kiu lingvo vi komunikis kun la migranto?

Ŝajne la ĵurnalisto konfuziĝis kaj post iom da paŭzo elbuŝigis:

-En la angla lingvo. Mi estas komencanto. Mi nun lernas tiun ĉi lingvon.

Ankaŭ la migranto ne estis denaska anglo.

-Ŝaŝa-





# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-  
XV-a

La onklino Izabela dormis sur la kanapo. En la fono mallaŭta muziko estis aŭdebla. Por li la melodio estis konata, sed li ne sciis de kie li konas ĝin.

Li haltis apud la kanapo kaj li longe rigardis la dormantan onklinon.

Li ne sciis, kion fari? Li timis veki ŝin. Krome li ne sciis, kion li diru al la oldulino.

Johano iris al la halo kaj li komencis foliumi la videgazeton. El la programtitoloj li elektis la novaĵojn. En la lastaj tagoj en Sunsistemo okazis nenio interesa. En iu fora galaksio planedo GX-32 pereigis, ĉar la tieaj estaĵoj erupciis gigantan militon kaj iu frenezulo hazarde aŭ vole premis butonon. Ĉio pereigis kaj la planedo malaperis por ĉiam. Kiu scias, kiom da planedo, eĉ sunsistemo suferis pro unu aŭ kelkaj frenezuloj.



Longe oni supozis, tia nur sur Tero povus okazi. En la kosmo sur aliaj planedoj, kie vivas raciaj estaĵoj la intelekto estas tiom evoluita, ke oni ne konas militon. Ĉie la estaĵoj scias, per hombuĉado ne eblas solvi problemojn.

Pri tio Johano enpensiĝis. Tiaj pensoj neniam venis en lian kapon ĝis nun.

Li ne rimarkis, ke sidante en la komforta fotelo li endormiĝis.

La onklino Izabela vekis lin per mildaj vortoj:

-Kara mia, ĉu vi tie ĉi? Kie vi estis? Mi jam ĉagrenis pro via malapero. Vi estis serĉita pere de Lunpolico. Antaŭ nelonge mi sendis mesaĝon al la viaj. Vi tre timigis min, Johaĉjo. Vi estas terura ulo. Kion mi faru nun? La tuta Luno vin serĉas. Ĉu vi estas malsata? Laŭ mi jes. Kiam vi manĝis lastfoje? Ho, dio mia, kiel vi aspektas. Ĉu ne vi estas malsana? Mi vokas robokuraciston. Ĝi estos tie ĉi post kelkaj sekundoj.

Antaŭ ol Johano povintus protesti la robotkuracisto alvenis kaj per ĝiaj radioj detale ekzamenis la pacienton. Baldaŭe sur ĝia ekrano ekaperis la diagnozo kaj la propono, kion fari en la estonto.

La robotkuracisto konstatis, nenio grava, li nur laciĝis kaj liaj nervoj estas iom trostreĉitaj. Johano devos ripozi multe kaj li manĝu multe da vitaminoj.

Tio ĉi iomete trankviligis la oldulinon. Ŝi tuj ordonis al la kuireja roboto kuiru vespermanĝon, kiun li pleje ŝatas.

-Ekde nun vi iros nenien sen mi – diris rigore la onklino. – Morgaŭ vi restos enlite dum la tuta tago. Ĉu vi komprenis? Maksimume vespere ni faros mallongan promenon en la proksima parko.

Johano eksaltis panike:


-Tio ne eblas. Morgaŭ mi havos randevuon kun...

-li ne finis la frazon, ĉar la onklino rapide interrompis lin.

-Kun tiu junulino. Ĉu ne? Kiel oni nomas ŝin?

-Elizabeto.

-Dio mia, mi jam esperis, ke vi forgesis tiun ĉi danĝerulinon – malgajiĝis la onklino kaj ŝi promenis al la fenestro.



Johano ekridetis.

-Kial danĝerulino, kara onklino mia? – li demandis scivole.

-Mi vidas, vi ne lernis el la okazintaĵoj. Kiomfoje devos ripetiĝi via malapero por ke vi lernu el ĝi. Tiu junulino estas la membro de timigita bando, mi povus nomi tiom mafio. Dank' al Dio, ke vi sukcesis liberiĝi el ilia mano. Kara Johano, mi petegas morgaŭ ne randevuu kun ŝi. Eble nun vi ne transvivos tiun ĉi renkontiĝon – diris serioze kaj petegante la onklino.

Ŝi reiris al la fotelo kaj ŝi ĉirkaŭbrakumis sian amatan nevon.

Johano ne respondis. Mute ŝi rigardis la plankon kaj cerbumis.

-daŭrigota-





# Poezio

Kara Leganto, ĉu vi jam provis verki verson en Esperanto?

Tio ĉi ne estas facila afero, sed inda tasko por provi.

Se vi havas belajn pensojn kaj sentojn, tiam ne hezitu, verku kaj verku ankaŭ en Esperanto!

Ne kredu, ke jam mortis la poezio! Nuntempe estas la plej grava la belaj enhavaj versoj. Rakontu vian ĝojon kaj triston en Esperanto kaj riĉigu nian kulturon.

Kompreneble traduki el la hungara literaturo estas laŭdinde. Ankoraŭ ekzistas multaj admirindaj hungaraj versoj, kiujn ni devus montri al la mondo.

Do, ek al la laboro! Verku kaj traduku!



Aŭtoro: Sándor Petőfi

## El malproksimo

Eta domo ĉe Danubo granda,  
tiel kara al mi, dismigranta!  
La palpebrojn al mi larmoj lavas,  
se ĝi al mi en memoron trafas.

Kial do mi lasis for ĉi domon?  
Nu, deziro gvidas ja la homon.  
Falkflugilojn havis la deziro,  
ĝi min logis post si por foriro.

Ĉe l' adiaŭkisoj de l' patrino  
de turmentoj brulis ŝia sino,  
kaj la flamon de la turmentbruloj  
ne estingis pluvo de l' okuloj.

Kiel ŝi min treme ĉirkaŭprenis,  
kiel ŝi min kun peteg' retenis.  
Ho, se tiam mi la mondon konus,  
la petegoj vane ne forsonus.

Ĉe l' aŭrora stelo de l' espero  
la futuro ŝajnas fea tero,  
nur se la tumulton ni enpaŝas,  
la erar' funebra sin malkaŝas.

Kial diri, ke la brilo pompa  
de l' espero estis logo trompa,  
ke de kiam vagas mi tra l' lando,  
nur sur dornoj paŝas mia plando!

Iuj iras mian hejmvilaĝon.  
Kian sendi al patrin' mesaĝon?  
Samhejmanoj, ŝin vizitu, kiam  
via vojo tuŝos domon nian.

Diru al ŝi, ke ŝi ĉesu larmi,  
ĉar favoras la fortuno al mi.  
Se ŝi sciis pri l' mizer' de l' filo,  
ŝian koron fendus maltrankvilo.

traduko de: Kálmán Kalocsay



Aŭtoro: Sándor Petőfi

## Min ne trafos puno dia...

Min ne trafos puno dia  
pro la serĉ' de am' alia.  
Vi min trompis, via amo  
estis nur fatamorgano.

Ne iradis mi lernejojn,  
kaj ne konas la literojn,  
el l' okuloj tamen legas:  
vian koron tristo regas.

Kio do? Ĉu vi ekpentis,  
ke vi tiel min turmentis?  
Pent' malfrua vin ĉagrenas,  
kio pasis, ne revenas.

Trovis mi alian, do vi  
provu mem alian trovi,  
Dio benu vin per tiu:  
amu, gaju, harmoniu!

traduko de: Kálmán Kalocsay





# Por infanoj

## Birdeto en la infanĝardeno



Ekstere sur la korto ludis la infanoj. La vetero estis sunriĉa. La pilko flugis alten kaj la etuloj estis tre gajaj.

Neatendite kie la infanoj ludis, malgranda birdeto flugis aŭ elfalis el la nesto. Sur la korto de la infanĝardeno estis kelkaj altaj, ombraj arboj kies inter la foliaro estis birdonestoj.

La etuloj ofte admiris ilin de sur la korto kaj ili aŭskultis la birdopepadon.

La malfeliĉa birdeto timeme baraktadis en la polvo. Ĝi ne povis imagi, kio okazos. Ĉirkaŭ ĝi staris amaso de la infanoj ka rigardis la birdeton.

Ili estis senkonsilaj. Iu knabeto kuris al la vartistino.

-Onjo Marika – li diris – ĉe la arbusto estas birdeto.

-Kompreneble, kara mia, tie vivas la birdoj.

-Sed tiu birdeto ne povas flugi. Ĝi elfalis el la nesto. Ni devus helpi al ĝi.

-Ĉu helpi? – ekmiris la vartistino. – Kiel ni povus helpi al malgranda birdeto.

La vartistino iris al la arbusto, kie la geknaboj ĉirkaŭstaris la birdeton. Ili ĉiuj estis tre malgajaj vidante la malfeliĉan birdidon.

Blonda knabeto preskaŭ plorante demandis la virinon:



-Onjo Marika, ĉu vi povas helpi al la birdeto? Ĝin atendas ĝia patrino en la nesto.

La vartistino ne sciis, kion ŝi faru. Ja, ŝi ne povas surgrimpi la arbon. Krome la nesto estos tre alte inter la branĉoj. Viro ne estis en la proksimo, kiu povus helpi.

Por ŝi estis ege ĝena la situacio. La vartistino ne deziris kaŭzi trompiĝon al la infanoj. Longe ŝi silentis. Ŝi ĉirkaŭrigardis kaj ŝi vidis, ke ĉiu de ŝi atendas helpon. Neeble, ke ŝi ne trovu solvon.

Kiel la fulmo en la somera nokto, tiel lumiĝis ŝia cerbo. Ŝi cerbumis pri grandioza ideo. En la strato estas la vilaĝa fajrobrigadejo. Eble la tieaj fajrobrigadanoj povus helpi. Ili havas longan ŝtupetaron. Certe ankaŭ la infanojn ĝojigos ilia helpo.



Ŝi tuj telefonis al la fajrobrigadejo. La telefonisto tre ektimis, kiam li ekaŭdis, ke oni petas helpon el la infanĝardeno. Nur tiam li trankviliĝis, kiam li sciigis, kio estus la laboro.

-Kompreneble kara onjo Marika, tuj mi sendos fajrobrigadon kun longa ŝtupetaro – diris la telefonisto. – Li remetos la elfalintan birdeton en la neston.

-Ankoraŭ mi havus etan peton – diris preskaŭ petegante la vartistino.

-Bonvolu diri!

-Se ne estus granda peto, bonvolu veni kun fajrobrigado-aŭto. La infanoj estus tre dankemaj kaj feliĉaj.

La telefonisto promesis, ke la peto estos plenumita. Bonŝanĉe nun nenie estas incendio kaj la fajrobrigadanoj estas liberaj.

La infanoj ne sciis, kio okazos. Ili ne bone aŭdis la paroladon. Ili timis, ke onjo Marika forgesiĝis pri ili kaj la birdeto. Ili malgaje diradis:

-Malfeliĉa birdeto. Ĝi mortos.

Ilian malĝojon interrompis neatendita alarmsireno de fajrobrigado-aŭto, kiu rekte venis al la infanĝardeno.

-Hura! Hura! – kriegadis la infanoj. – La onkloj fajrobrigadanoj savos la birdeton. Ili portas altan ŝtupetaron. Rigardu, kiel lerte tiu onklo iras supren al la nesto kun la birdeto.

Ili pravis, apenaŭ pasis kelkaj minutoj kaj la elfalinta birdido estis en la nesto.

Ĉiu ĝojegis, precipe la infanoj. Ili savis birdeton. Posttagmeze, kiam ili pretiĝis iom dormeti, birdo flugis al la fenestro. Ĝi estis la patrino de la elfalinta birdeto. Ĝi dankegis la helpon al la infanoj per admirinda trilado.

-OnkloAdalberto-



# Migrantoj

# Migrantoj

